

5-a Interlingvistika Simpozio

La Interlingvistikaj Studoj (Etnolingvistika Instituto, Novfilologia Fakultato, Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, Pollando) organizas sian kvinan internacian interlingvistikan simpozion inter **17-18.09.2020 en Poznano en [virtuala formo](#)**. La ĉefa temo:

Rolo de lingvoj en interkultura komunikado

Priskribo:

Interkultura komunikado estas ĉiutaga afero en nia tutmondiĝinta epoko. La renkontiĝo de homoj el malsamaj kulturoj povas konduki al miskomprenoj kaj konfliktoj. Nur la kono de la propra kaj alia kulturoj, konscio de kaj malfermiteco por malsameco povas gvidi al efika interkomunikado. Ankaŭ la uzata lingvo inter la komunikantoj (ĉu la gepatra lingvo de unu el la partneroj aŭ komuna interlingvo) havas sian rolon en la sukceso de la komunikado. Kian rolon havas la internaciaj lingvoj kiel la angla, hispana ktp. kaj la internaciaj planlingvoj kiel esperanto, ĉu en interpersona, ĉu en internacia kunteksto, staras en la fokuso de simpozio.

Prelegoj pri la sekvaj **temoj** estas bonvenaj:

- naturaj lingvoj en interkultura kaj internacia komunikado
- lingvaj miskomprenoj kaj konfliktoj en interkultura komunikado
- lingvopolitiko en plurkulturaj kaj -lingvaj landoj
- komunikado de enmigrintoj kun la lokanoj
- lingvaj defioj en la ŝanĝiĝanta Eŭropo
- komunikado per Esperanto:
 - lingvaj trajtoj kiuj helpas la interkulturan komunikadon
 - literaturo kiel portanto de internaciaj valoroj kaj temoj, kiel ponto inter kulturoj
 - instruado al interkulturaj valoroj
 - esperanto-movado por egalrajta komunikado
- aliaj internaciaj helplingvoj en interkultura komunikado

Ĉiu prelego havos 30 minutojn inkludante 10 minutojn por diskuto. Power Point prezentaĵoj estas konsilataj (Power Point MS Office 98-2003).

Elektitaj prelegoj aperos libroforme en la serio *Język. Komunikacja. Informacja / Language. Communication. Information.*

Konferencaj lingvoj: angla, esperanto, pola

Konfirmitaj prelegantoj:

Prof. Věra Barandovská-Frank, Prof. Nicolau Dols Salas, Prof. Sabine Fiedler, prof. Federico Gobbo, prof. Przemysław Grzybowski, Prof. Wim Jansen, Prof. Goro Kimura, Prof. Ilona Koutny, dr Katalin Kováts, Jan van Steenbergen, dr Ida Stria, Prof. Bengt-Arne Wickström

Plilongigita limdato por prelegproponoj: [15.07.2020](#)

Konfirmo de akcepto por prelegoj kaj afiŝoj: 05.08.2020

Ne estas konferenca aliĝkoto.

Aliĝo:

Por aliĝi (kun / sen prezentado) bv. sendi la kunsenditan formularon rete.

Aliĝilo kaj demandoj estas sendendaj al la sekva adreso: interlingv@gmail.com

Organiza Komitato:

Ilona Koutny, prof.

Ida Stria, dr

Michael Farris, mgr

Scienca Komitato:

Věra Barandovská-Frank, prof., Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino

Renato Corsetti, prof., Universitato La Sapienza en Romo, Italio

Probal Dasgupta, prof., Indian Statistical Institute, Kolkata, Barato

Nicolau Dols Salas, prof., Universitato de Balearaj Insuloj, Hispanio

Sabine Fiedler, prof., Universitato de Leipzig, Germanio

Michele Gazzola, prof., Universitato Ulster, Granda Britio

Federico Gobbo, prof., Universitato de Amsterdam, Nederlando

Przemysław Grzybowski, prof., Universitato de Bydgoszcz, Pollando

Wim Jansen, prof., Universitato de Amsterdam, Nederlando

Kimura Goro Christoph, prof., Sophia University, Tokio, Japanio

Ilona Koutny, prof., Adam Mickiewicz Universitato, Poznano, Pollando

Katalin Kováts, dr., Edukado.net, Nederlando

Jan van Steenberg, NI, vicprezidanto de Language Creation Society, Berkeley (CA)

Ida Stria, dr, Universitato de Varsovio, Pollando

Humphrey Tonkin, prof., Universitato Hartford, Usono

Bengt-Arne Wickström, prof., Andrásy Universitato, Budapeŝt, HU; Humboldt Universitato, Berlin, DE

Kontakto:

Interlingvistikaj Studoj, Etnolingvistika Instituto (prof. Ilona Koutny, Michael Farris)

Adam Mickiewicz Universitato

Al. Niepodległości 4.

PL-61-874 Poznań, POLAND

interlingv@gmail.com / interlin@amu.edu.pl

<http://interl.amu.edu.pl>